# N I A  V O Ĉ O

**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **FEBRUARO 2000**

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto

<u>ĜENERALA KUNVENO DE MEL</u>

Al ĉiuj membroj de MEL, en aparta folio, ni inkludas protokolon de la Ĝenerala Kunveno de nia asocio okazinta la 24-an de janŭaro.

**KOTIZO POR 2000 KUN DONACO**

*La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol la lastaj* ***sep*** *jaroj. Bv. se vi ankoraŭ ne pagis ĝin* ***sendi ĉekon po 2.250 pesetojn****, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭ-dankon pro via kontribuo al daŭrigado de MEL.* ***Se vi pagas rekte al la kasisto en nia kunveno, lunde vespere en Rodriguez San Pedro 13-3º-7) vi ricevos kiel donacon esperantan T-ĉemizon.***

<u>HISPANIO</u>

La pasintan januaron Jorge Camacho prelegis en la Universitato de Salamanko, Fakultato pri Filologio, kompreneble la temo estis esperanto.

En Salamanca aperis nova grupo de esperanto, la nomo estas “Laŭtoj” kaj la adreso: ctricio@stanmedia.com

11-A KONGRESO DE VALENCIA ESPERANTO-FEDERACIO KAJ MURCIO. 1-2ª de aprilo. Loko: La bela kaj historia urbo Requena, provinco de Valencia (Hispanio)

<u>ESPERANTO EN INTERRETO</u>

La plej fama esperanta lernolibro verkita en latinameriko por hispanaj parolantoj: “¿Sabe usted esperanto?. Jorge Hess, estas konsultebla en intereto:
http:*//members.tripod.com/verdulo*
Vi povas legi la revuon “Andaj Ondoj” de Kolombia Esperanto Ligo ĉe:
*//members.tripod.com/Kolombia_Eo_Ligo/andajondoj*
Se vi deziras voĝaji tra esperantujo vi povas profiti la oferon de Pasporta Servo kie multaj esperantistoj akceptas gastoj en siaj hejmoj senpage aŭ malmultekoste. Se via jam komencis pripensi kiel organizi vian someron, eble ĉi tiu adreso estos interesa por vi.
*//home.wxs.nl/□lide/ps_lingv/ps_es.htm*

<u>ESPERANTO EN AMAS-MEDIOJ</u>

Ana Manero estis intervjuita ĉe HEF per ĵurnalisto de la madrida radio “Onda Imefe”. Li trovis HEF-informojn traleginte la HEF paĝojn en interreto: *//www.esperanto-es.org*

En la sekcio “Cartas al director” de la ĵurnalo ABC aperis, kun subskribo de Antonio López Casa (Adra, Almería), letero rekomendanta la uzon de esperanto kiel internacia komunikilo, li argumentas la bonan akcepton de aliaj internaciaj aferoj kiel la metra sistemo.

<u>VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO</u>

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.
Kursoj: Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18. Por triaaĝuloj.
Universidad Autónoma de Madrid. Lunde kaj merkrede 12-13h.
Informas Marco Trevisán 915 617 613 <oxartum@esperanto.nu>
Prelego: 21 de Februaro je la 19,00 “Jen Hispanio: Sorio”. Lumbildoj

<u>HEF ANGULO</u>

Lunde kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: admin@esperanto-es.org

Inter la 6a kaj la 9a de aprilo okazos la foiro pri lingvoj EXPOLINGUA 2000, kiel pasintjare HEF partoprenos kun budo laŭ la nomo Esperanto. Oni esperas tiel sukceson kiel la pasintan jaron.

| **NIA VOĈO** | **FEBRUARO 2000** | 1999 |
|---|---|---|

## 59-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO- HEF KONGRESO
**29a Aprilo ĝis 1a de Majo 2000. San Sebastián de los Reyes (Madrid)**

*Informoj ĉe: www.esperanto-es.org/kongreso/inicio.htm:*

Grava informo, la **kongresejo** kiu aperis en la lasta numero de Nia Voĉo ne estas la korekta, la Kongreso okazos en la **Centro Rosa Luxemburgo**, estrato Federíco García Lorca s/n. de San Sebastián de los Reyes. La kongresejon oni povas atingi per la buso 154C ekde Plaza de Castilla, 35 minutojn.

La grupo de organizantoj (ne ekzistas formala LKK, Manolo Pancorbo estas la kunordiganto de la grupo) kunvenas regule por la aranĝo de diversaj programeroj de la Kongreso. Ni sendas kopion de la kotizoj kun la peto de dissendi inter la membroj de viaj asocioj.

KOTIZOJ EŬROJ (PESETOJ)

| **Kategorioj** | **ĝis 1a de marto** | **post 1a de marto** |
|---|---|---|
| **HEF-ano** | **30 (4.991)** | **39 (6.489)** |
| **Ne HEF-ano** | **36 (5.989)** | **45 (7.487)** |
| **Juna HEF-ano** | **21 (3.494)** | **27 (4.492)** |
| **Juna ne HEF-ano** | **27 (4.492)** | **33 (5.490)** |

1.- Pagu vian kotizon al- Caja Postal: 1302-0116-51-0024189825
2. Sendu la pagpruvilon kun viaj datumoj al oficejo de HEF.

LOĜADO
La organizantoj de la kongreso **ne** faros rezervojn por loĝado. Kiel *helpo* al la kongresanoj, jen listo de *sugestitaj* loĝejoj:
**Hoteloj**
**Melia Castilla** **** Capitán Haya 43, Madrid, tel. 91 5675000 (1)
**Aitana** **** Pº Castellana 152, Madrid, tel. 91 3440068 (1)
**Tryp Centro Norte** ** Mauricio Ravel 10, Madrid, tel. 91 7333400 (1)
**Grand Prix** ** Ctra. de Burgos, km. 16, Alcobendas, tel. 91 6524600 (2)
**Gastejoj**
**Los Ángeles** *** Artistas 18, Madrid, tel. 91 5330375 (3)
**Cuatro Caminos** *** Artistas, 7, Madrid, tel. 91 5531992 (3)
**Arba** ** Huesca 37, Alcobendas, tel. 91 56543412 (2)
**Frontón** **, Ctra. de Burgos, km 16, Alcobendas, tel. 91 6523437 (2)
**Aliaj**
**Albergue**, Santa Cruz del Marcenado 28, tel. 91 5474532
**Camping Madrid**, Ctra, N-I Madrid-Burgos, km 11 (salida 10), tel. 91 3022835

(1) Tre proksime de Plaza de Castilla, de kie startas la buso al la kongresejo
(2) Tute apuda urbeto Alcobendas. Proksimaj bushaltejoj por la kongresejo.
(3) 15 minutojn metroe de Plaza de Castilla.
(4) 30 minutojn metroe de Plaza de Castilla.

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
**San Alejandro 6-4ºB**

ACTA Nº 35

En los locales de la Federación Española de Esperanto, el día 24 de enero de 2000, a las 19,30 horas, en segunda convocatoria, se celebró, previo anuncio en el boletín "Nia Voco, la asamblea general ordinaria de ESPERANTO LICEO DE MADRID.

La Predidenta abrió la sesión procediendo la Secretaria a tratar los diversos puntos del orden del día:

1.- **Informe sobre los socios**.

Socios en situación de alta a 31 diciembre 1999: 53

| | |
|---|---|
| Al corriente de pago | 40 |
| Con una cuota pendiente | 6 |
| Más de una cuota pendiente | 6 |
| Socio de honor | 1 |

Variaciones en 1999:

| | | |
|---|---|---|
| Altas | 4 | Nª 515, 516, 517 y 518 |

2.- **Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea anterior**. Las actas nº 34 se publicó en el boletín del mes de febrero-99 para comentarios. Al no recibirse ninguno fue aprobada por unanimidad.

3.- **Balance económico 1999**. La secretaria comentó el informe publicado en el nº de enero-99 del boletín indicando que faltaban por incluir 2.102 pesetas de intereses que se ingresaron el mismo día 31, se incluirán en el próximo ejercicio, Los ingresos han dismunuido al no hacer Lotería de Navidad. El saldo a favor del Liceo a 31-12-1999 es: en c/c banco Atlántico 263.471 pesetas, en depósitos a plazo 3,5M, en caja 5.850 pesetas, en cuenta UEA-Rotterdam 12.235 pesetas; total 3.782.560 pesetas. El balance de ejercicio fue aprobado por unanimidad.

4.- **Presupuesto 2000**. El presupuesto previsto para 2000 asciende a 150.000 pesetas. Un año más se ha congelado la cuota anual de socios de número (2.000 ESP). El presupuesto, publicado en "Nia Voco" enero-00, fue aprobado por unanimidad.

5.- **Actividades desarrolladas en 1999**. Se aprobó por unanimidad la memoria publicada en el número de diciembre-99 del boletín en la que se resumen las actividades llevadas a cabo durante el pasado año. Los presentes felicitaron a la Directiva por el amplio programa llevado a cabo a pesar de la escasez de medios.

5.- **Programa para 2000**. El programa de actividades, presentado por la secretaria, continúa en la línea de difundir, propagar y facilitar la práctica del esperanto a quienes lo deseen, así como fomentar las actividades lúdico culturales entre socios. Se indicó que se contunuará en la línea de ayuda y apoyo a la Federación Española de Esperanto, especialmente durante este año en el que el Congreso Nacional tendrá lugar en la Comunidad de Madrid. El programa presentado fue aprobado por los presentes.

El boletín "Nia Voco" continuará siendo redactado por Lupe Sanz Bueno en colaboración con Manolo Parra.

6.- **Ruegos y preguntas**

Algunos miembros sugieren que se estudie la posibilidad de invertir el capital de otra forma más rentable. Se acuerda estudiar las ofertas del mercado.

La Secretaria recuerda que la Junta Directiva, elegida en 1997 para un período de cuatro años, inicia su cuarto y último año de mandato.

Al no haber ningún otro ruego o pregunta se dió por terminada la Asamblea General a las 20,00 h**.**

**El original lleva la firma de la Secretaria y el Vº Bº de la Presidenta**



# Premio Klara Silbernik

*Francisca Jimenez Valenzuela*

*Ĉi tiu premio, estimata samideanino Francisca, celas rememori kaj honori la personecon de Klara Silbernik, edzino de d-ro Zamenhof, kaj en ĝi ni vidas la subtenon, kiun la edzo konstante ricevas de sia edzino. Tamen, kelkaj homoj opinias ke ĝi simbolas tute simple la submetiĝon de la edzino al edzo. Kion vi pensas pri tio?*

Mi nur povas diri al vi ke mi kaj mia edzo havas saman opinion. Ni konsideras nin kun samaj rajtoj, kio donas al ni grandan interkompreniĝon. Do, ni alte taksas la helpon de s-ino Klara Silbernik al sia edzo kaj reciproke mi povas diri.

*Kiam en la geedza paro ekzistas interkompreno, pri kio ajn, estas nediskuteble, ke la feliĉo regas en la hejmo. Ĉu vi pensas, ke Esperanto alportis al via hejmo plian feliĉon?*

Mi pensas, ke Esperanto alportis feliĉon al nia hejmo. Kiel dirite, feliĉe nia interkompreniĝo estas perfekta kaj en tiu bona etoso mi ankaŭ kalkulas lian kaj mian laboron por la E-movado.

*Kara samideano Platas, mi jam scias pri via helpemo kaj laborado en la iama Madrida Esperanto-Liceo, ĉu vi pensas, ke sen la helpo de via edzino, via agado en la Liceo estus estinta la sama?*

Estas evidente ke, sen la helpo de mia edzino, mia laboro, mia dediĉo al la E-movado en la sino de MEL estus estinta tute alia. Nenia riproĉo estis inter ni pri tiu mia agado en nia antaŭa Liceo. Mi ripetas, kiam estas interkompreno kaj amo, neniam "oni kontrolas" kiu helpas al kiu.

*Iom post iom la virino akiras sian emancipiĝon, kaj ĝuste tion celas la Premio Klara Silbernik, meti la virinon samrangen kun la viro. En tiu stadio de la ĉiutaga kunvivado, ĉu vi povas rakonti al ni iun anekdoton de via E-a kunvivado?*

Pro mia laboro, mi multe vojaĝis kaj mi konstatis la bezonon de lingvo internacia. En unu el tiuj vojaĝoj mi konis mian edzinon, en Valdepeñas kaj post tri gefianĉaj rilatoj ni geedziĝis. Hodiaŭ ni havas tri gefilojn: du virinojn kaj unu viron. Mia scio pri Esperanto estis pere de la jurnalo *España de Tanger* el la tiel nomata malalta Andaluzio. Poste mi aliĝis al MEL, kie mi estis kasisto.

*Ni travivas specialajn cirkonstancojn de nia ĉiutaga vivo. Venas la nomata progreso de la scienco kaj la tekniko, do la kunlaborado de virino kaj viro estas tute necesaj en ĉiuj aspektoj kaj precipe por ni esperantistoj en la lingva problemo. La demando de nia moderna vivo kaj precipe por ni esperantistoj en la lingva problemo. La demando estas: Ĉu tiu kunlaborado ŝultro ĉe ŝultro inter geesperantistoj estas tute necesa?*

Estas tute necesa la kunlaborado inter geesperantistoj, alimaniere Esperanto ne progresos kaj se tiu kunlaboro okazas inter geedzoj, kiuj bone interkomprenas sin, la rezulto ne povas esti alia ol kontentigaj fruktoj. Kaj mi instigas ĉiun edzinon helpi sian edzon en ĉiu tasko por Esperanto, kaj mi ankaŭ povas diri male, ke ĉiu edzo helpu sian edzinon ĉu por Esperanto aŭ en alia sfero de la vivo.

*Mi ne scias kiom longe vi estas geedzoj, sed mi volas vin demandi: Ĉu Esperanto ne estis kvazaŭ flago, kiu subtenis almanaŭ parte vian geedziĝecon?*

Ni jam festis la kvardek jaran datrevenon de nia geedziĝo kaj ni estis kaj estas tre feliĉaj. Kompreneble, Esperanto plifortigis nian kunvivadon dum tiuj kvardek jaroj, Kaj varme ni deziras, ke daŭre ekzistu tiu interkompreno inter ni. Ĉu mi helpas lin, Ĉu li helpas min, kun la certeco, ke kiun ni vere helpas estas Esperanto.

*Intervjuis Luís Serrano*

Boletín

*Nº 344 januaro/februaro 2000*

## 59a Hispana Esperanto-Kongreso

San Sebastián de los Reyes (Madrid),
29a de aprilo—1a de majo 2000
Kongresejo:
Centro Rosa Luxemburgo
C/ Federico García Lorca s/n

*ALIĜILO N-RO......*

*(BONVOLU SKRIBI TAJPE AŬ PRESLITERE)*

Familiaj nomoj ............................................
Antaŭnomo:..................................................
Naskiĝdato (2) ........................ HEF-numero ..................
Adreso ......................................................
.................................... Poŝtkodo ..................
Urbo ................................ telefono ....................
Retadreso............................ faksilo ....................
(2) Nur por statistiko

| Kongreskotizoj en eŭroj: | ĝis la 1a de marto | poste |
|---|---|---|
| HEF-ano | 30 | 39 |
| Ne HEF-ano | 36 | 45 |
| Juna HEF-ano | 21 | 27 |
| Juna ne HEF-ano | 27 | 33 |
| Donacon | | |
| ENTUTE: | | |

Kotizu pere de Caja Postal, konto-numero: 1302-0116-51-0024189825; aŭ pere de la UEA-konto: hefb-m. Poste kunsendu la pagpruvilon kaj la aliĝilon al la suba adreso.

***Por bankĉekoj kaj poŝtmandatoj aldonu 10%***

*LA KOTIZO ESTAS NE REPAGEBLA.*

Dato kaj subskribo ..............................................

**Hispana Esperanto-Federacio**
Rodriguez San Pedro 13 - 3° - 7
ES-28015 Madrid

www.esperanto-es.org
kongreso@esperanto-es.org
Telefono kaj faksilo: +34 914 468 079

## PROGRAMA PROVISIONAL / *PROVIZORA PROGRAMO*

26 FEB.

### CONFERENCIAS / *PRELEGOJ*:

- **Miguel Fernández**
  "*Nuntempaj esperanto-poetikoj*" (Poética contemporánea en esperanto).
- **Sabine Trenner**
  "*Paclaboro en Bosnio post la milito*" (Trabajo por la paz en Bosnia tras la guerra).
- **Jorge Camacho**
  "Conferencia inaugural" (*Festprelego*).
- **Amelia Fernández**
  "Criterios históricos de defensa de la lengua" (*Historiaj defend-kriterioj de la lingvo*).
- **Miguel Ángel Sancho**
  "*Informadika balotkontrolado*" (Escrutinio electoral informático)
  "*Prezento de HEF-retpagxaro*" (Presentación de las páginas de Internet de la federació
- **David Galadí**
  "*Astronomio*" (Astronomía).

### OTRAS ACTIVIDADES / *ALIAJ AKTIVAJXOJ*:

- **Jorge Camacho**
  "*Literatura ataliero*" (Taller de literatura).
- **Antonio Valén**
  "Curso de iniciación al esperanto" (*Esperanto-kurso por komencantoj*).
- **Miguel Gutiérrez**
  "*Kvizo*" (Concurso).
- **Sabine Trenner**
  "*Aktiviga teatrumado*" (Teatro de participación).
  "*Vojoj el la konflikto - traktado de aliaj opinioj*" (Resolución de conflictos: actitud ante las opiniones ajenas
- **Miguel Fernández**
  "*Vizito al la muzeo El Prado*" (Visita al museo de El Prado).
- **Carmen Suárez**
  "*Vesperaj madridaj trarigardoj*" (Visitas nocturnas por Madrid).

### REUNIONES OFICIALES / *OFICIALAJ KUNSIDOJ*:

- *Solena malfermo* (Inauguración oficial).
- *Gxenerala asambleo* (Asamblea general de socios).
- *Estrarkunsido* (Reunión de la directiva).
- *Patronara kunsido de Fundación Esperanto* (Reunión del patronato de la Fundación Esperanto).
- *Solena fermo* (Clausura oficial).